

La lastaj tagoj de d-ro L. L. Zamenhof

Elda Doerfler

19a Esperanto-Konferenco de Alp-Adrio Brežice,
Slovenio, la 22an de aprilo 2017

14^A DE APRILO 2017



Organizaĵo de
la Unuiĝintaj
Nacioj por Edukado,
Scienco kaj Kulturo

La 100^a mortodatreveno de Ludoviko Zamenhof

Solenata sub la aŭspicio de UNESKO



Omaĝo de UNESKO al D-ro Zamenhof 2016-2017

38. La ekzekutiva Oficejo de UNESKO enskribis D-ron **L. L. Zamenhof** inter la proponoj de celebrado por la jaroj 2016-2017 sekve de propono de Pollando, kun subteno de Germanio kaj Slovakio (propono n° 28).

Ekzekutiva konsilio Cent-naŭdek-
sesan sesion

196 EX/25.INF

PARIZON, la 18an de marto 2015

Nur en la angla kaj en la franca.

Punkto 25. de la provizora tagordo
PROponoj DE LA MEMBRO-ŜTATOJ RILATE AL
LA SOLENADO DE LA DATREVENOJ AL KIUJ
UNESKO POVUS ASOCIIGI EN 2016-2017

28. Centjaro de la morto de Ludwik Zamenhof, okulkuracisto kaj lingvisto (1859-1917) (Pollando, subtenate de Germanujo kaj Slovakio)

Naskita sine de plurnacia medio en la urbo Białystok, L. Zamenhof (1859-1917) kreis la unuan version de sia **Internacia Lingvo** ekde sia plej frua infanaĝo. En 1885, Zamenhof impete efektivigis sian projekton de internacia lingvo tia kia ni konas ĝin nun. En 1887, li publikigis studlibron en la rusa : «La internacia lingvo—Enkonduko kaj kompleta metodo », sub la pseŭdonimo **Doktoro Esperanto**. Tiu pseŭdonimo signifas «La doktoro kiu esperas» kaj disfamiĝis kiel nomo de tiu lingvo. La saman jaron, la studlibro estis publikigita en la pola, franca, germana kaj angla lingvoj.

La unuaj esperanto-kluboj aperis, kaj la avantaĝoj de tiu lingvo estis agnoskitaj de la lingvistoj mem. En 1905 okazis en **Boulogne-sur-Mer** (Francujo) la unua Tutmonda Kongreso de Esperanto. Dum sia unua restado en Francujo, Zamenhof ricevis la nacian **Ordenon de la Honorlegio**. En 1906, li publikigis la «homaranismon», kiel ideon de kunigo de ĉiuj nacioj komunikantaj per komuna lingvo.

La esperanto-movado kiun lanĉis Zamenhof, disvolviĝis en la tuta mondo.

Ĝia kreinto rezignis ĉiujn siajn rajtojn, disponigante Esperanton al ĉiuj.

La laboro de L. Zamenhof estas mondscale konata en pli ol 120 landoj.

Multaj estas fascinitaj de la ideo uzi komunan lingvon, kaj multnombraj estas tiuj kiuj povis krei iun, sed tiu de Zamenhof estas la sola kiu ricevis tutmondan sukceson.



Honora Legio - Francujo



La Granda Kruco de la Ordeno de Izabela la Katolikino

**La lastaj tagoj de
D-ro Ludoviko Lazaro
Zamenhof**

kaj

La funebra ceremonio

London la 16^{an} de aprilo 1917




2017 – Jaro de la morto de nia Majstro. Tra la mondo solene la esperantistoj memoras lin, por ke lia personeco ne falu en forgesiĝon.

Li estis malaltstatura, korpe, sed giganta, spirite. Sian tutan vivon, sen lace kaj senkompate al si mem, li dediĉis sin al la kara idealo alporti al la tuta homaro pacon, amon, interfratiĝon per sia genia komunikilo.

Neniam li perdis la esperon kaj konstante, obstine kaj paciencie daŭrigis sian laboradon, ĝis sia lasta vivotago, por la progreso de siaj ideoj.

Al ni, liaj posteuloj, li transigis la pezan torĉon: ni ne perfidu lin kaj en plena akordo kaj konkordo, sen disputoj, daŭrigu laŭ la vojo de li signita!

*Ĉiu el ni konas sufiĉe bone
la biografion de nia
 eminentulo (espereble!) sed
 estas interese aŭskulti
 kelkajn vortojn de lia frato,
 d-ro Leono Zamenhof, pri lia
 ĉiutaga vivo.*



Tre unutone fluis la vivo de l' aŭtoro de Esperanto. Ĝi ne estis torento forŝiranta la bordojn, aŭ brua fantaziplena vivo de artisto. Ĝi estis nur mallaŭta murmuro de sopiroj je pli belaj tempoj, la senespera revo pri noblaj idealoj ...

Li leviĝis ordinaro je la 8^a horo matene. Post tralego de ĉiutaga gazetaro li tuj alpaŝadis al sia metia okupo. Laboro malfacila kaj ekstreme laciga. Tion plej bone montras la nombro de la akceptitaj de li ĉiutage malsanuloj, kiu ofte trapasis ciferon 50! ...

Je la 2^a horo ordinare finiĝis la vizitoj. Post mallonga ripozo sekvis la tagmanĝo. Je la 4^a ree komenciĝis oficiale la metia laboro. Ĝi daŭris ĝis la 6^a-7^a horoj ...



Kiam alvenis tiu horo, tiam eksonadis la momento de lia ĝusta vivo, oferita al lia amata ideo! Ne granda estis tiu ĉi resto de l' tago, sed Ludoviko Zamenhof sciis ĝin eluzi neordinare fruktodone.

Malgraŭ la grandega laciĝo post la tuttaga laboro lia animstato vespere revigliĝis kaj resereniĝadis; novaj fortoj enfluadis en lian organismon, fortoj ĉerpitaj eble el la malriĉaj provizoj de lia malfortika estaĵo kaj senŝpare eluzitaj.

Mallonga interrompo por vespermanĝo je la 8.30 kaj Ludoviko Zamenhof tute separiĝis de sia familio por ekdroni absolute en la esperanta laboro. Lia plej granda malfeliĉo estis, kiam iu, nekoninta pli proksime liajn vivkutimojn, interrompis tiujn sanktajn por li horojn de laboro. Je la 11^a-12^a finiĝis la kutima tago de la aŭtoro de Esperanto...

Senŝanĝe fluis jaro post jaro. Nur en la epoko de la kongresoj antaŭ la somero, la vivo iomete ŝanĝiĝis. La ekstere trankvila ĝis nun tagordo fariĝis pli febra. La vivo eble plivigliĝis, la animstato pliĝojiĝis, sed samtempe la provizfortoj ankoraŭ pli elĉerpiĝadis ... Fine alvenis la tagoj de kongreso, la tagoj plenaj de entuziasmo, de ekstrema nervekscito, kiuj, bedaŭrinde, neniam influis bonfare lian sanstaton...



La gesinjoroj ZAMENHOF
kun la Kvaro por la Kvaro.
D-ro MYBS - D-ro SCHRAMM
S-ino HANKEL - D-ro ARNHOLD

Jen bildeto el la vivo de D-ro Zamenhof kvazaŭ filmfragmento.

Ĉu mi bezonas aldoni, ke li, kiu ekstere ŝajnis kvietan egalanimecon, interne kaŝis grandegan agenergion, kiu paŝo post paŝo ruinigis lian malfortan delikatan organismon? La fino ne povis do esti alia.

La terura milito nur plirapidigis ĝin.

D-ro Leono Zamenhof



1904



1905 - kun la Honora Legio



1907



1910 - En Kopenhago, dum UK



1913 - UK en Berno kun la filo Adamo



1914 - Franzensbad - Monumento dediĉita al LLZ




En familio: 1916 - malantaŭe la filino Sofio kaj Carlo Bourlet

Alproksimiĝas la vivofino...



1906

Edmond Privat, kiu fine de 1916 vizitis en Varsovio la kreinton de Esperanto, vidante lian malsanan aspekton, baldaŭ forlasis lin kaj al la tutmonda esperantistaro faris la meditigan proponon, aranĝi la sekvontan kongreson en la ĉefurbo de Polujo, por evitigi al d-ro Zamenhof longan vojaĝon. Jam pli frue travojaĝintoj rakontis pri malbona farto de la Majstro.



1950



L. L. Zamenhof, 1917, la plej lasta fotografajo

Ĉar “... lia kormalsano komencis disvolviĝi tuj post la eksplodo de la milito”, d-ro *Leono Zamenhof* skribas.

“La atakoj de la brusta angino, komence maloftaj, en la majo de la pasinta jaro fariĝis tiel oftaj, ke ili tute malebligis al li ne nur metiajn okupojn, sed ankaŭ lian plej amatan laboron por Esperanto. Tiuj atakoj ofte aperadis, kelkfoje tage kaj nokte forpeladis de li kvietan dormon.”



“La doloriga stato de lia sano malĝojige influis lian psikon. “

“... De oktobro ĝis februaro d-ro Z. sin sentis relative pli bone...”

“En tiu pli hela intertempo de lia malsano la mortinto regajnadis esperon por nova laboro kaj revis pri la progreso de siaj ideoj post la milito.... En tiu tempo li ekhavis la ideon verki ampleksan Esperantan vortaron. *“Pri tio li skribis al Maria Hankel el Dresden, sed lia lasta letero al ŝi restis nekompleta inter la pluraj liaj manuskriptoj.*

La 1^{an} de aprilo samideano majoro *Neubarth*, la havena komandanto de Varsovio, lastfoje parolis kun la Majstro; li rakontas, ke d-ro Zamenhof estis ĝojige freŝa kaj bonhumora, kaj lia voĉo sonis preskaŭ klare, kontraste kun la obtuzeco de la lastaj jaroj.



Sed tiu momenta bonfarto, tre mallonge daŭris.

Daŭrigas tiel Leono Zamenhof:

“Ŝajne la malboniĝon de lia sanstato kaŭzis la neatendita ekscio pri la morto de nia frato d-ro Aleksandro, kiun li tre amis, kaj kiu mortis en Rusujo la pasintan jaron, estante milita kuracisto en Rusujo.



En la lastaj tagoj la malsano de Ludoviko Zamenhof akre malboniĝis.

La koro lacigita pro konstantaj atakoj jam ne povis normale plenumi sian funkcion; komencis aperadi la signoj de kora malforteco.

Tiuj tagoj estis vera turmento por li. La lito, kiun li en la lasta tempo forlasadis nur tre malofte, kaj kiu kvietigis liajn fizikajn turmentojn, fariĝis por li fonto de novaj doloroj. “



... “La vido de lito estis por li de tiu tempo turmentoj de Tantalo!”...

“Sed baldaŭ la sida pozicio fariĝis por li ankaŭ suferiga! En tiuj turmentoj de la lastaj kelkaj tagoj la dormo aŭ ia ajn ripozo estis por li tute neebla.”...

...“Malgraŭ tiuj grandaj fizikaj kaj psikaj doloroj mi neniam aŭdis de li ian plendon. Nur unu fojon li esprimis deziron, ke la morto, se ĝi estas jam por li neevitebla, venu almenaŭ sen grandaj turmentoj. Videble li supozis, ke lin atendas ankoraŭ pli grandaj suferoj.”

“La 14^{an} de aprilo la stato de d-ro Z. rapide pliboniĝis; la koro komencis labori pli forte, kaj malaperis la signoj de ĝia akra nesufiĉeco. La kuracistoj havis esperon, ke venos pliboniĝo.”

... “D-ro Ludoviko estis en tre bona humoro.”...

“Je la 5^a horo vizitis lin lia konstanta kuracisto kaj amiko d-ro K., kiu konstatis ĉe li efektivan pliboniĝon. Post duonhora amika interparolo, sentante sin iom laca, mia frato petis la permeson de la doktoro iom ripozi sur divano.”...

“Ĝi estis lia lasta memvola movo!”



“Kiam lia edzino alproksimiĝis, por prepari al li oportunan kuŝejon, ŝi jam trovis sian edzon malviva! La morto alvenis subite kaj, kiel deziris la mortinto, sen turmentoj.”

“Li foriris el ĉi tiu mondo kun plej bonaj pensoj, tute ne sentante, ke li forlasas ĝin por eterne! ”

D-ro Leono Zamenhof

Skribis la filo Adamo Zamenhof: ...“La lastaj semajnoj de lia vivo estis por li tre malĝojaj. Li denove jam ne fumis... Kvankam li neniam plendis, ĉar li ne volis, ke iu alia ankaŭ suferu, kiam li suferas, tamen li aspektis tiel malĝoje kaj kompatinde, kiel neniam ĝis tiam, mi lin vidis.” ...



“Sed ŝajnas, ke ĝis la morto li ne tiom pensis pri si mem, kiom pri sia kara ideo, per kiu li volis feliĉigi la homaron, kaj li sentis sin vere malfeliĉa, ke pro la malsano li ne plu povis plenumi sian ĉiutagan taskon, kiu devis konduki lin al la venko.”

“La lastan tagon li fartis pli bone. Ŝajnis al li, ke li denove povos rekomenci la laboron, kaj tiu penso bone influis lian humoron.

Sed lia koro ĉesis bati, eble en la momento, kiam li pensis:
Ho mia kor’, ne batu maltrankvile, ...”

**Ho, mia kor',
Ne batu maltrankvile,
El mia brusto nun ne saltu for!
Jam teni min ne povas mi facile,
Ho, mia kor'!**

**Ho, mia kor'!
Post longa laborado
Ĉu mi ne venkos en decida hor'?
Sufiĉe! trankviliĝu de l' batado,
Ho, mia kor'!**

La tre malĝoja, funebra anonco telegrame disvastiĝis tra la mondo.
Jen kelkaj el la raportoj aperintaj en la E-ĵurnaloj.


The
BRITISH ESPERANTIST.
THE OFFICIAL ORGAN OF THE BRITISH ESPERANTO ASSOCIATION.

Vol.° XIII. N.°-ro 149. MAJO, 1917. PREZO 3 PENCOJ.

LAZARO LUDOVIKO ZAMENHOF.

Naskiĝis la 15an de Decembro, 1859.
Mortis la 14an de Aprilo, 1917.

Supozeble preskaŭ ĉiu leganto nun scias, per la telegramo el Amsterdam aperinta en la tagĵurnaloj de la 16a de Aprilo, pri la raportita morto de nia KARA MAJSTRO, D-ro ZAMENHOF, en Varsovio, sabaton, la 14an de Aprilo. La sekretario de la B.E.A. tuj telegrafis al la U.E.A. en Genevo por venigi per ĝi konfirmon de la raporto kaj esprimi al la familio Zamenhof sincerajn kondolencojn. Tiu konfirmo fine alvenis. Nenece estas diri, kun kia profunda sento de malĝojo kaj preskaŭ de konsterniĝo oni ricevis la unuan sciigon. La morto de Zamenhof certe ne povus esti tuta neatenditaĵo, kiel estis tiu, kiu nin tiel dolore frapis en la pasinta jaro, ĉar ĉiu sciis, ke de longe li tre suferis pro kormal-



DOKTORO L. L. ZAMENHOF,
Elpensinto de la Lingvo Internacia Esperanto.

sano. Tamen laŭ raportoj de S-ro Privat, vizitinta lin en la lasta Decembro, li ŝajne resaniĝis, kaj ni ricevis la ĝojan esperon lin vidi post la milito en tiu rolo, pro kiu ja li donis al ni sian lingvon. Sed, ho ve! tio ne fariĝos, kaj de nun nur restas por ni priplori lian morton kaj, sub la inspiro de lia modesta, sindona kaj sinforĝesema vivo, unuanime penadi pli forte kaj fervore ol iam antaŭe, dadrigi la mondobenantan laboron de li kamentitan.

Al Sinjorino Zamenhof, la sindona ĉiam helpanta, kuraĝiginta edzino de nia majstro, al liaj tri gefiloj kaj al liaj fratinoj ni deziras esprimi la plej sincerajn kondolencojn de la tuta brita Esperantistaro.

XIV^a Jaro. N^o 201 (5) « Monata » 5 majo 1917

ESPERANTO

Oficiala organo de UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

JARA ABONO	REKLAMO
Ordinara eldono 5.— Frankoj (2.— Sm.)	Reklamo (1 linio aŭ ĝia spaco) 0.50 Fr. (0.20 Sm.)
Luksa eldono 6.25 Frankoj (2.50 Sm.)	Anonceto (1 linio: 10 vortoj) 0.40 Fr. (0.16 Sm.)
<i>Senca politika konto 1.824.— Oni akceptas nur tujjarajn abonojn.</i>	Korespondado (1 enskribo) 0.50 Fr. (0.20 Sm.)
<i>La abonoj komenciĝas de la 1^a de ĉiu monato</i>	Rubatoj: 4 enpresoj 10%; 12 enpresoj 25%; 24 enpresoj 50%

Direktoro: HECTOR HODLER — Redakcejo & Administrejo: 10, rue de la Bourse, GENEVE (Svisujo)

TEKSTO: La morto de D-ro Zamenhof: Nekrologio, H. Hodler. Zamenhofoj Paroloj. — Esperantismo: La entombigo de D-ro Zamenhof. Kroniko. Diversaj. Tra la Gascara. — U. E. A.: Oficiala informilo. Esperanta vivo.

MORTO DE DOKTORO ZAMENHOF

Kun granda ĉagreno ni komunikas al niaj legantoj kaj al la tuta Esperantistaro, ke nia kara Majstro, Doktoro L. L. ZAMENHOF, subite mortis en Varsovio la 14 aprilo 1917.

Telegramo anoncanta la funebran informon aperis en granda nombro de gazetoj, tiel ke multaj Esperantistoj kredeble jam scias pri tiu kaj plej profunda bedaŭro.

nova kruela bato.

La morto de nia Majstro estis konfirmita al ni per speciala telegramo. Pliaj detaloj ankoraŭ mankas.

Al Sinjorino Zamenhof, dolorige frapita, kaj al la tuta familio Zamenhof ni sendas, en la nomo de ĉiuj Esperantistoj, la esprimon de nia tutkora simpatio

BRAZILA ESPERANTISTO

OFICIALA ORGANO
de "BRAZILA LIGO ESPERANTISTA"

8-a Jaro

Numero 3-4-5

JARABONO
En Brazilio 3\$000
Eksterlande 5 fr. (2 Sm.)

Marto - Aprilo - Majo 1917

REDAKCIO—PRAÇA QUINZE DE NOVEMBRO
RIO DE JANEIRO — BRAZILIO


DRO L. L. ZAMENHOF

Bedaŭrinde la sciigo, kiun ĝoje ni ricevis de nia samideano E. Privat pri la baldaŭa resaniĝo de nia kara Majstro, ne sin konfirmis. La 16-an de Aprilo telegramo el Amsterdamo komunikis al ni, ke dro Zamenhof mortis en Varsovio.

Sed ĉu li efektive mortis? Ne, li ne mortis, ĉar la vivo de la homoj daŭras dum daŭras ilia bonfaranta laboraĵo.

«Ne mortos jam nia bravega anaro,
Ĝin jam ne timigas la vento, nek staro».

Al lia familio Brazila Esperantisto en la nomo de la brazila esperantistaro sendas sincerajn kondolencojn.



Kaj la laboro de Zamenhof estas el tiuj, kiujn oni neniam plu forgesos, ĉar se oni rigardos la historion de l' tempoj, oni ne trovos pli persisteman batalanton pro la plibonigo de l' homaro.

Ne, li ne mortis!

Li ankoraŭ staras spirite sur la vojo elektita montrante la vojon celitan kaj kuraĝigante nin li ankoraŭ kantas:

Ni legu nur kelkajn vortojn el tiu ĵurnalo:
“La 16^{an} de aprilo, telegramo el Amsterdamo komunikis al ni, ke d-ro Zamenhof mortis en Varsovio.

Sed ĉu li efektive mortis?

Ne, li ne mortis, ĉar la vivo de la homoj daŭras dum daŭras ilia bonfaranta laboraĵo.

Ne, li ne mortis!

Li ankoraŭ staras spirite sur la vojo elektita montrante la vojon celitan kaj kuraĝigante nin, li ankoraŭ kantas:

“Ne mortos jam nia bravega anaro.

Ĝin jam ne timigas la vento, nek staro.”...

I Jaro. V Num. 1917

Majo.—Madrid



ILUSTRITA REVUO MONATA
OFICIALA ORGANO DE ZAMENHOFA KAJ ANDALUZIA FEDERACIOJ.

Dr. L. L. Zamenhof
Varsovio, str. Dzika № 9.

Des de Madrid
24/ma 1917

Kara Ligo!

Mi ricevis viajn florojn
Dankon al vi kaj al la koro
admiranta de viaj kunlaborantoj.
Mi de ĉiuj mi sendas al vi
saluton, kaj mi esperas,
ke venonta jaro mi vi
vidos en Berlino. La kordoj
de la presato kaj sendado
de la karto mi kun danko
redonos al vi en Berlino
Viaj floroj

El la “Hispana Esperantisto” Majo 1917

Zamenhof mortis!!

Via pura spirit' amis homaron,
por ĉiuj estis frata via koro,
estis via deviz' am' kaj honoro
al kiuj vi aldonis gloran faron.

Ne timante la montojn, nek la maron
brile flugadis ĉien via gloro
kaj ĉie restos via rememoro
kiun la homoj metos sur altaron.

Nun tra la mondo kuras sanga fluo,
nun ploras via familia rondo,
la planed' tremas pro pafada skuo

kaj la ŝip' brulas sur la mara ondo...
kaj dum regas malamo kaj detruo
jam vi ne povas resti sur la Mondo.

Rafael de San Millán



“Mi longe ne volis kredi, ke li jam ne estas inter ni. La unuan sciigon pri lia morto ni traegis en la ĉiutaga gazeto “Rannjee Utro”, presiginta telegramon pri lia morto el Kopenhago.” ...

“Do, li mortis! Li mortis izolita de la patrujo, ĉe la ĉielruĝo de la nova vivo, pri kiu li revis tutan sian vivon! La sorto ne destinis, ke li estu atestanto de konstruado de ĉi tiu nova vivo, en kies fundamenton li metis, julie 1887, unu el la plej grandaj ŝtonoj. Tia ŝtono estas lia libro...” A.S.

La funebra ceremonio

Lundon la 16^{an} de aprilo 1917

El artikolo aperinta en la pola gazeto Glos (17 aprilo 1917):

La Varsoviaj Esperantistoj amase kunvenis hieraŭ por ĉeesti la funebran ceremonion kaj akompani al lia lasta hejmo D-ron Lazaro Ludoviko Zamenhof, kreinton de Esperanto, lingvo, kiu jam de multaj jaroj estas konata en la tuta mondo.



En la parto de la Reĝa (*Królewska*) strato kondukanta al N-ro 41, kie loĝis la mortinto, staris liaj amikoj kaj adeptoj.

Ĉe la sono de la tria horo,
la ĉerko estis alportita kaj
la irantaro ekmoviĝis.
De strato al strato novaj
aroj aliĝis, ĝis la procesio,
post trapaso de la Reĝa
strato, la placo de
Saksujo, la placo de
l' Teatro, la stratoj
Vierzbowa, [....], **Dzika** kaj
Gesia, alvenis je la hebrea
tombejo.

En str. Dzika n° 9
la procesio haltis antaŭ
la domo kie loĝis Familio
Zamenhof dum multaj jaroj.



En 1931 strato Dzika titoliĝos *ulica Dr. Ludvika Zamenhofs*

Ĉe la mortintejo atendis kantoro
Sirsta kun sia ĥoro; kiam la
funebra akompanantaro haltis, ili
eksonigis religian kanton.



Samuel Abraham
Poznanski
Rabeno de la Granda
Sinagogo en Varsovio

Ĉe la tombejo, D-ro
Samuel Abraham
Poznanski, elokvente
salutis la mortinton,
kiu senhalte kaj
nelacigeble laboradis.
*Dank' al la talento
ricevita el Dio, li kreis
Esperanton,
tiamaniere helpante al
la starigo de pli bona
homaro.*



Aŭskultante la paroladon de rabeno Poznanski



Oni akompanas
la ĉerkon en la
tombejon.

Post la Rabeno, je la honoro de S-ro Zamenhof paroladis unu el liaj proksimaj kunlaborantoj, publicisto Leo Belmont.


“En tiun ĉi tombon – li diris – oni deponas la mortintajn restaĵojn de la granda homo, sed vivanta estas lia animo, kun ni ĝi ĉiam restos, ĉar senmorta estas lia verko. Inter la multaj kvalitoj de la mortinto, la plej granda estis la modesteco tiel en la privata vivo kiel dum la naŭ internaciaj kongresoj, ĉe kiuj oni aranĝis por li kvazaŭ reĝan akcepton.



1909 - La solena UK-malfermo en Barcelono

Ĉie kaj ĉiam li restadis trankvila kaj modesta laboranto, kaj kvankam tra la tuta mondo li estis konata, li ŝajnis ignori sian gloron. Lia verko, ŝatita de multaj lingvaj eminentuloj, ne estas ankoraŭ sufiĉe komprenata en Polujo, sed proksimiĝas la momento, kiam Varsovio kaj la mondo komprenos la valoron kaj gravecon de la verko de S-ro Zamenhof por la homaro.

Tio estos, kiam ĉe la proksima kongreso Varsovio vidos, ke el ĉiuj teranguloj alkuras la Esperantistoj por deponi sur lian tombon kortuŝajn kaj dankajn rememoraĵojn!”




Leopold Blumental
Pseŭdonimo Leo Belmont

“ Tra la mistera pordego inter vivo kaj morto homo eminenta trairis, per paŝoj same mallaŭtaj, kiel dum sia tuta vivo, li trairis en senmortecon!

Ĉar mortis nur viro modela, patro amema, frato perfekta, amiko elkora, kuracisto diligenta kaj oferema, civitano de noblo eksterordinara kaj homo mirinde dolĉa - kaj nur lian morteman restaĵon ni, humiliĝante al la leĝoj de l' senkompata naturo, redonas al teropatrino...”

Leo Belmont





En Esperanto lastfoje adiaŭis sian amikon la sama, - estas miriga destino de l' direktanta ĉiopovo - kiu la unua salutis lin en lia lingvo, *Antoni Grabowski*.

Li diris:

“Funebraj aŭskultantoj, karaj samideanoj!
Granda doloro trapenetas niajn korojn; ni staras ĉe la ĉerko de nia kara Majstro. Foriris en la regionon de l' eterneco geniulo, kies venon sur la teron atendis jarcentoj, kiu estis kvazaŭ elektita de l' Providenco, ke li fine solvu la gravan problemon de lingvo internacia, pri kiu antaŭ li multe da pensuloj revis kaj vane laboris.” ...

... Vi ja scias, kiom pezajn oferojn li faris por la efektivigo al sia verko:

*“La junecon li ploranta
Metis mem sur la altaron
De la devo ordonanta,”*

kiel li mem konfesas en sia unua kanto. ...




Parolado de Antoni Grabowski,
Prezidanto de la Pola Esperanto-Asocio

Kun kortuŝo mi rememorigas al mi, kiel, antaŭ tridek jaroj, mi la unuan fojon salutis nian Majstron en la lingvo internacia: tiam okazis la unua interparolo Esperanta. Ĉu tiam mi povis antaŭŝenti, ke mi staros ĉe via ĉerko, por diri al vi, kara amiko, la lastan: adiaŭ! en Esperanto! Adiaŭ! Kaj ĝis revido en pli bona mondo sen doloroj kaj suferoj!



Varsovia samideanaro



Entombigo de la ĉerko

Sed ne! vi ne foriras, vi vivas kaj vivos eterne en la mondo, kiam ni, viaj fidelaj lernintoj, jam longe estos foririntaj; vi vivos en la koroj de niaj posteuloj, ĉiam pli granda, ĉiam pli adorata bonfaranto de l' homaro. Vi eniris en la panteonon de l' senmortaj geniuloj.

Arbeto, kiun, Majstro kara,
Vi plantis ĉe Vistul-rivero,
Elkreskis ĝis lazuro klara,
Etendis branĉojn ĉirkaŭ tero.

En niaj koroj, granda homo,
Jam staras viaj monumentoj,
La gloron de l' benata nomo
Ripetos ĉiuj la jarcentoj!



1910 - D-ro Zamenhof kune kun Kazimierz Bein (Kabe), Antoni Grabowski, Leo Belmont, Leono Zamenhof


Post la penadoj de la vivo ripozu
kviete, la tero estu por vi malpeza!"

Antoni Grabowski



Dr. L. L. ZAMENHOF
AŬTORO de ESPERANTO
Naskiĝis, 15 - 12 - 1859
Mortis, 14 - 4 - 1917

Fotografio
de la Maistro okazis de la
V.^a Universala Kongreso
okazinte en Barcelono
dum la jaro 1909.



D. ro L. L. Zamenhof
KREINTO DE ESPERANTO 1859-1917



La unua tombo





Ĉe la tombo de la Majstro

Spirite venis mi, pilgrima ombro
alpelita de sento danktributa,
kaj pie haltas ĉe l' dezerta tombo,
kie ripozas Via cindro muta.

Antaŭ Vi, Majstro, restas mi medite:
min rabas foren, alten, embarase
memoraj pensoj fluaj vaghezite,
kirliĝaj ŝtorme en la mens' amase.

Mia spirito trista kaj izola
sereniĝas ĉe Via tomb' azila,
je nevidebla ombro prikonsola.
Ripozu pace, granda hom' humila!

En kor' fekundis Via nobla gvido,
zorge kulturis Via pac-armeo,
tra l' vasta mondo, kun konstanta fido,
la semojn de l' interna fratideo.

Kun Vi en mondon venis nova sento,
post Vi restas ĉe ni la venkespero:
ke la amo triumfu en kunsento,
ke la ĝojo ekfloru el sufero.

LUIGI MINNAJA

23

Ĉe la tombo de la Majstro

Spirite venis mi, pilgrima ombro
Alpelita de sento danktributa,
Kaj pie haltas ĉe l' dezerta tombo,
Kie ripozas Via cindro muta.

Antaŭ Vi, Majstro, restas mi medite:
Min rabas foren, alten, embarase
Memoraj pensoj fluaj vaghezite,
Kirliĝaj ŝtorme en la mens' amase.

Mia spirito trista kaj izola
Sereniĝas ĉe Via tomb' azila,
Je nevidebla ombro prikonsola.
Ripozu pace, granda hom' humila!

En kor' fekundis Via nobla gvido,
Zorge kulturis Via pac-armeo,
Tra l' vasta mondo, kun konstanta fido,
La semojn de l' interna fratideo.

Kun vi en mondon venis nova sento,
Post Vi ĉe ni la venkespero:
Ke la amo triumfu en kunsento,
Ke la ĝojo ekfloru el sufero

Luigi Minnaja

Ni ne estas tiel naivaj, kiel pensas pri ni kelkaj personoj: ni ne kredas, ke neŭtrala fundamento faros el la homoj anĝeloj; ni scias tre bone, ke la homoj malbonaj ankaŭ poste restos malbonaj; sed ni kredas, ke komunikiĝado kaj konatiĝado sur neŭtrala fundamento forigos almenaŭ la grandan amason de tiuj bestaĵoj kaj krimoj, kiuj estas kaŭzataj ne de malbona volo, sed simple de reciproka sinnekonado kaj de devigata altrudo...

Parolado en Cambridge, 1907.





**19-a ESPERANTO - KONFERENCO
de ALP-ADRIO
Brežice – Slovenio, 22-23 aprilo 2017**



Dankon pro la atento!

Edele Doojler